ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO 4

Aprilo 2017 Kol. 384/33

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Enhavo: Alkoholaĵo kaj homaro Finkalkulo La 15-a Renkontiĝo en Saarbrücken La 11-a B.I.E.Ro Trista anonco

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Agrablajn Paskofestojn kaj printempajn tagojn ni elkore deziras al ĉiuj niaj legantoj. *red.*

Alkoholaĵo kaj homaro

Kiel **e**n multaj diversaj aferoj, la antikvaj grekoj povus esti por ni modelo ankaŭ en trinkado de ebriigaj alkoholaĵoj. En siaj grandaj pokaloj ili miksis vinon kun akvo. La unua pokalo estis „por sano“, la dua „por plezuro“ kaj la tria „por dormo“. „Kiam ĉi tiu tria glaso estas fintrinkita, saĝaj gastoj iras hejmen“ instigas la poeto Eubúlos jam antaŭ 2500 jaroj.

Sed li eksplikas ankaŭ la efikon de pluaj pokaloj. De la kvara, kiu apartenas al perforto ĝis al la deka, kiu aludas frenezecon. Interalie honestaj virinoj en la antikva Grekio ne rajtis trinki alkoholaĵon – la tradicio diras, ke la kiso estiĝis testo, per kiu la edzo kontrolis, ĉu lia virino en la tempo de lia neĉeesto ne trinkis.

Kie estas la lulilo de alkoholo? Al tiu ĉi honesta difino kandidatas Gruzio, Ĉinio kaj Irano. Ĉi momente gvidas Ĉinio, kiu anoncis trovon de ujo kun la restoj de 9000 jarojn malnova vino el rizo, mielo kaj frukto.

La homaro eble gustumis la unuan fojon alkoholaĵon en la formo de fermentintaj fruktoj.
Kun iom da troigo ni povas diri, ke malforta alkohola ebriiĝo helpis al kreema talentulo inter la homaro kaj la energio entenata en ebriigaj trinkaĵoj al ili donis fortojn por elprovi novajn progresdefiojn. Do, ĉu ni povas kuraĝe aserti, ke alkoholo estas unu el la ĉefaj ekbruligaĵoj de progreso de la homaro? Kelkaj fakuloj estas konvinkitaj kaj pruvas tion ankaŭ iuj novaj studoj.
La ritoj en la ŝtonepoko vekis la psikoaktivigajn elementojn de alkoholo kaj per tio stimulis nian kreemon kaj subtenis la evoluon de lingvo, arto kaj religio. Alkoholo helpas en la cerbo liberigi materiojn, kiuj faras nin feliĉaj, fortaj kaj kapablaj venki la problemojn de ordinaraj tagoj. Ĝi aldonadas kaloriojn, do energion kaj altvalorajn vitaminojn – ĉefe el la vico B. Ĝi havas ankaŭ antisepsajn ecojn, do prevente ĝi likvidas malutilajn mikrobojn.

Ni ne scias, kiu la unua inventis „la unuan prabieron“. Eble ĝia apero okazis samtempe en kelkaj lokoj; sed estas ĉi tie nova kuraĝa teorio. La ĉasistoj kaj kolektistoj en la ŝtonepoko onidire daŭre ekloĝis kaj kulturis grundon ĉefe por kultivi plantojn por posta bierfarado. Cerealoj, kiuj kreskis sovaĝe baldaŭ ekmankis. Niaj antaŭuloj kapablis kuiri bieron ekzemple el ruĝa pipro, betula limfo, kaktoj, kakao kaj en la meza Azio, kie kreskas nur herbspecioj, el ĉevalina lakto. Jam antaŭ 1000 jaroj estis konata vico da specoj de biero, kiuj estis ankoraŭ spicitaj per multaj diversaj ingrediencoj. Same estis gustigita vino. Estas interese, ke antikvaj Romianoj trinkis ĉefe blankajn trinkaĵojn, sed por eksporto ili kultivis vinojn ruĝajn. Sed la vinoj restis trinkaĵo de elitoj. Normalaj malriĉaj homoj trinkis bieron kaj mielvinon.
Ĉu ni povas diri, ke la alkoholo instigis la prahomon al hejma kampmaniero de la vivo kaj donis al li energion por elpensado kaj realigado de novaj aferoj? Laŭ la plej novaj ekkonoj tio estas tre versimila teorio. El la ĵurnalo tradukis J.Rýznarová

Finkalkulo de AEH de la jaro 2016 + budĝeto por la jaro 2017

	budĝeto 2016	realo 2016	budĝeto 2017
Enspezoj			
vendo de varoj, servoj	0	70	0
interezoj el kuranta konto	10	5	10
dotoj, donacoj	30 000	18 250	20 000
membrokotizoj	30 000	24 740	30 000
seminarioj	6 000	700	110 000
ekskursoj	0	0	0
Sume	**66 010**	**43 765**	**160 010**
Elspezoj			
materialo	15 000	31 715	15 000
poŝto, telefono, interreto	25 000	26 089	26 000
riparoj, servoj	0	2 000	2 000
gazetoj, libroj	500	490	500
kunvenoj	1 500	375	5 000
impostoj	0	250	500
vojaĝelspezoj	5 000	0	5 000
banko	1 100	370	500
seminarioj	6 000	0	104 000
salajroj	1 500	0	0
ekskursoj	0	0	0
dotoj, donacoj	2 000	249	500
Sume	**57 600**	**61 538**	**159 000**
Enspezoj - elspezoj	**8 410**	**-17 773**	**1 010**

Rimarko:

Kontero "Materialo 2016" inkludas aĉeton de portebla komputilo.

Lenka Angelová p.p.m.
prezidantino de AEH

Inĝ. Stanislava Nováková p.p.m.
kontistino de AEH

La 15-a Novjara Renkontiĝo en Saarbrücken 27.12. 2016 - 3.1. 2017

Post unu jaro ni denove renkontiĝis en Saarbrücken por kune festi la Novjaran renkontiĝon en gaja kaj amika etoso. La evento estas organizata de la asocio EsperantoLand. La ĉeforganizanto Lu Wunsch-Rolshoven kun pluraj helpantoj pretigis interesan jarfinan semajnon. Pri la programo zorgis Betti Maul, pri la tekniko okupiĝis Pjotr de Mulder kaj Klaus Rumrich. Al la programo multe kontribuis ankaŭ Ines kaj Christoph Frank. La renkontiĝon partoprenis 196 geesperantistoj el 15 landoj ne nur el Eŭropo. Ĉeestis multaj familioj kun infanoj kaj gejunuloj ĝis 19-jaraĝaj.

Riĉa programo kontentigis ĉiujn ĉeestantojn. Ni povis ĝui diversajn prelegojn, diskutrondojn, laborgrupojn, atelierojn, kvizojn, kaj diversnivelajn Esperanto-lingvokursojn. Oni povis lerni ankaŭ la hispanan. Ne mankis riĉa libroservo, variaj tabloludoj, vesperaj filmoj, malstreĉa gimnastiko aŭ ritme vigla zumbo, kurso de tango kaj ĉendancado. Intereson vekis plibonigo de la memoro per la japana lingvo, budaisma plenkonscia meditado, balada kulturo de Feroaj insuloj, la libroarto-Orimoto kaj aliaj programeroj.

Ni eksciis kiu inventis la komputilon kaj kial la homoj neas sciencon, kien iros Eŭropo post la briteliro, pri la dana filozofo Martinus, pri liberalaj religioj, pri Duolingo, pri la Edena ĝardeno, pri justa komerco, pri gravitaj ondoj, pri Esperanto en Afriko, pri perspektivoj de Eŭropa Unio kaj eĉ pri bano, duŝo kaj necesejoj tra la mondo. Interesis nin matematika prelego pri senfineco, ĝiaj problemoj kaj paradoksoj, la historio de Kubo kaj Usono, la vivo en strangaj mondoj kaj la vivo sur la orientfrisaj insuloj.

Ni diskutis pri monda politiko, pri enmigrantoj, pri disvastigo de Esperanto, pri ReVo (Reta Vortaro). La projekton "Unu leciono pri Esperanto, por ĉiuj lernejanoj" proponis Lu Wunsch-Rolshoven. Pri la demando "Ĉu normalaj infanoj ankoraŭ ekzistas?", prelegis kaj diskutis Martin Markarian. Pri "Ĉu reguligita laŭleĝigo de kanabo estas dezirinda?" raportis kaj diskutis Markos Kramer. Gijom' Armid organizis seminarion pri "Vivi por feliĉi aŭ feliĉi por vivi?"

Okazis tradukateliero kun Brian Moon kaj István Ertl, konstruo de sorobano kun Kimie Markarian, Risko-kvizo kun Edy Van den Bosch, scienca kvizo por teamoj kun eksperimentoj kun Klaus Rumrich, skeĉoj de Mirejo Grosjean okaze de la jaro de lernado.

Ni spektis bildprezentojn de Amri Wandel pri Slovakio, Slovenio, Montenegro kaj pri *Petra*, la antikva mistera ĉefurbo en la jordana dezerto. Bernard-Regis Larue gvidis nin tra parkoj de *Yellowstone* kaj *Colorado* en Usono. Ulrich Brandenburg rakontis kaj montris interesajn bildojn pri Portugalio, kie en la jaro 2018 en Lisbono okazos la 103-a Universala Kongreso. Li donis al ni emon partopreni ĝin.

Ankaŭ la infanoj ĝuis tre riĉajn programerojn en multaj atelieroj. Interesis ilin pretigado de pilkoj por ĵonglado, origamio, fabrikado de strigoj kaj aŭtoj el kartono, pupetoj el ŝtofoj. Ne mankis rostado de bananoj kun ĉokolado, preparado de filmeto farita el fotoj, poŝtranĉiloj, kantado, ĵonglado, feltumado kaj ornamo de kandelingoj. La plej malgrandaj kun entuziasmo sekvis Mazi-kurson. Plaĉis al ili ludado kun samaĝuloj kaj libera petolado. Dum la paŭzoj

virinoj trikis, iuj komputilis, legis, kartludis aŭ babilis ĉe glaso da vino, biero aŭ kafo.

Estis prezentitaj fotoj el la pasintjara NoRo, beletra Almanako. Vespere ni ĝuis pup-teatraĵon: "Avino! kriĉas Filipo" fare de Christoph Frank, koncerton de ĴeLe kun akompano de la kubano Geomar. Plezure koncertis ankaŭ Gijom' kaj Kim. Dum la Internacia vespero prezentiĝis niaj talentuloj. Ni ĝuis pian-, kontrabas-, violon-, kaj flut-ludadojn, ĵongladon, ĥorkantadon, dancadon, kanĵi-kvizon kaj skeĉojn de István Ertl. Ĉe la fino Lu Wunsch-Rolshoven dankis al ĉiuj kontribuintoj kaj al la partoprenintoj de la aranĝo. Gaje ni bonvenigis la Novan jaron 2017 per tostoj, kisoj kaj esperon por venonta renkontiĝo. *Liba Gabalda*

La 11-a B.I.E.Ro =Brila Internacia Esperanto-Renkontiĝo

okazis dum la semajnfino de la 17-a ĝis la 19-a de marto 2017 en Náchod. La internacian etoson ĉi-foje prizorgis dudek unu partoprenantoj el sep landoj: Ĉeĥio, Germanio, Pollando, Hungario, Slovakio, Svedio kaj Ukrainio. Post la loĝigo en konvenan studentloĝejon restis tempo por komune aĉetumi en bazarego. Reveninte al la domo, la pli frue antaŭpagintaj partoprenantoj estis regalataj per bonveniga biero, kaj ĉiuj ricevis detalan programon de la aranĝo.

Ĉar ni dum la seshora vojaĝo ne sukcesis tagmanĝi, mi tre antaŭ-ĝojis vespermanĝon en la loka restoracio Vatikán. Fortiĝinte per bongustaj manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, el kiuj estis tie granda elekto, ni

baldaŭ reiris al nia loĝhejmo, ĉar en la restoracio estis iom laŭte por la oficialaj bonvenigaj programeroj.

Dume ĉiuj kreeme ornamis tason al partoprenanto, kies nomon oni lotumis. Tiamaniere ĉiu partoprenanto ricevis sian individuan renkontiĝtason, kiu daŭre restas neforgesebla memoraĵo pri la 11-a B.I.E.Ro. Poste ni formis plejeble signifajn E-vortojn uzante plej multajn el la disponeblaj literaj kartetoj. La vespero agrable finiĝis per libera babilado kun gustumado de manĝaĵoj, kiujn la partoprenantoj kunportis.

Sabate matene ni ne hastis ĉe la buntega matenmanĝo, al kies riĉeco – kiel tradicie por B.I.E.R-amantoj – ĉiu partoprenanto kontribuis. La vetero estis tre pluva kaj venta. Ni trankvile sidiĝis en bela kafejo. Nur poste ni ekis al la tagmeza celo – la ĉaleto Dobrošov. Elekteblis veturi tien buse aŭ malgraŭ la pluvo iri piede. La vojo estis tre bela, alterne tra arbaro kaj ekster ĝi, tiel, ke se ne estus forta nebulo oni povus multe vidi. Tre surprizis nin vidi neĝon sur la monteto!

Posttagmeze ni vizitis la lokan bierfabrikon Primátor, kie la gvidisto al ni montris produktejojn kaj klarigis tre multajn detalojn. Ni vidis, per kiaj aparatoj oni enboteligas kaj enbareligas bieron, lavas botelojn kaj barelojn; specialan plastan neredoneblan barelon por landoj, kiuj kutimas ne redoni malplenajn barelojn; kie oni kuiras kaj ripozigas bieron. Ni eĉ rajtis gustumi la ŝaŭmon de ripozanta biero, kiun oni ne metas en la bieron, ĉar ĝi estas vere tre amara. La gvidisto tre diligente emfazis, kiom pli bona laŭ li estas la biero ĉeĥa ol la germana. La fabriko ne havas propran sekigejon por malto kiel

kelkaj aliaj, kiujn ni vizitis dum pasintaj BIERoj, do ili aĉetas ĝin precipe el Germanio, ĉar tie ĝi estas malpli kosta. Por ke ĉiuj eksterlandanoj povu kompreni tiujn interesajn detalojn, Vít ĉion tre sperte interpretis al Esperanto. Fine de la trarigardo ni estis regalataj per diversaj specoj – proveblis kvar bieroj elkranaj kaj diversaj el boteloj, inter kiuj estis ankaŭ kelkaj limonadoj, tiel, ke ĉiu trovis sian ŝatatan likvaĵon. Dimanĉe la vetero estis pli bona tiel, ke ni ĝuis ĉesunan promenadon kaj tra la urbocentro kaj al la bela kastelo, kie ni vidis ankaŭ tre tristan urson vivan. Mi tre ĝojas, ke mi partoprenis – kun la partoprenantoj eblis abunde paroli nian belan lingvon kaj travivaĵoj estis tre diversaj. Ankaŭ mi dankas la organizantojn, ke ĉio estis zorgeme preparita. Jam mi antaŭĝojas pri la 12-a renkontiĝo de B.I.E.Ro.

El retpaĝoj de E-mental

Trista anonco

Post grava malsaniĝo forpasis en neĝisvivitaj 95 jaroj nia multjara membrino kaj kara amikino
PhMr. Danuše VOKÁČOVÁ el Olomouc. Ŝia koro ekdormis la 12-an de marto 2017.
Honoron al ŝia memoro. red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj
Redaktoroj: J. Rýznarová, L. Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941** SKYPE : jary_esperanto
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Bankovní spojení: Poštovní spořitelna, číslo účtu AEH **192150088**, kód banky **0300**
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (nad vaší adresou) jako variabilní symbol!
Roční předplatné časopisu Informilo = 200,-Kč, příspěvek svazu dobrovolný.
La jarabono de Informilo 15 €. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.